**ANNO LV** **Marzo - Aprile 2006**

## BOLLETTINO D'INFORMAZIONE AI SOCI

### INDICE

- I nostri prossimi venerdì
- Lingva kaj trejna seminario
- 30a Internacia Junulara Festivalo
- 37a Internacia Infana Kongreseto en Prato
- Il vino degli esperantisti
- Invito al la 83a kongreso de 100jara GEA
- Grava somera festivalo en Britio
- L'ERA alla Commissione Cultura della Camera
- Una TV esperantista
- Revene el Japanujo - Raporto
- Interŝanĝo de mesaĝoj inter UNESCO kaj UEA
- Prelego pri Esperanto en milana biblioteko
- Estrarkunsido
- Ravenna – vincitori del "Fabelkonkurso"
- Turismo per Esperanto
- Niaj pasintaj vendredoj
- Klaĉangulo
- Notizie dal mondo

**Circolo Esperantista Milanese**
Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 *(solo venerdì sera)*
*e-mail:* esperantomi@infinito.it
*rete*: http://www.infinito.it/utenti/esperantomi/
*C.C.P.* 26448209

## I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ ore 21,15

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**Venerdì 3 marzo**
è aperta a tutti la

**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 10 marzo**
nova etapo de

**LA TRADUKA RONDO**

**Venerdì 17 marzo**

**LA LINGVA RONDO**

con la lezione 12a di "Paŝoj al plena posedo".

**Venerdì 24 marzo**
Dopo il simpatico incontro nella solita vicina pizzeria alle ore 19.30 (prenotarsi in sede o da Rodari, tel. 02-2364190), in sede si continua a conoscere il mondo. Questa volta dal Sud America si va in Africa

**DA CITTÀ DEL CAPO ALLE CASCATE VITTORIA**

attraverso il Sudafrica, il Botswana, lo Zimbabwe e lo Zambia

**Venerdì 31 marzo**

**TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTISTAN GAZETARON**

**Venerdì 7 aprile**

**LA TRADUKA RONDO**

**Venerdì 14 aprile**

**LA SEDE RIMANE CHIUSA -- BUONA PASQUA A TUTTI !**

**Venerdì 21 Aprile**
Preceduta da.... un incontro preparatorio nella solita pizzeria (vedi sopra per le modalità) e come da regolare convocazione pervenuta a tutti gli associati, in sede avrà luogo la

**ASSEMBLEA ANNUALE DEL CIRCOLO ESPERANTISTA**

alla quale tutti hanno il diritto-dovere di partecipare.

**Venerdì 28 aprile**
konstante daŭras

**LA LINGVA RONDO**

Ĉifoje la temo estas la 13a leciono de "Paŝoj al plena posedo"

**Venerdì 5 maggio**

**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 12 maggio**
jen denove

**LA TRADUKA RONDO**

**Venerdì 19 maggio**
*Programma da definire:* probabile conferenza preceduta dalla pizza.

## LINGVA KAJ TREJNA SEMINARIO

**Itala-Federacio** kunlabore kun **Florenca Esp.-Asocio** organizas, de la **29a de aprilo** ĝis **1° de majo** 2006, lingvan kaj trejnan seminarion.

La **lingva parto** de la seminario antaŭvidas la du jenajn instrunivelojn:

- *Baza* – por tiuj, kiuj havas nur esencan konon de esperanto kaj intencas plibonigi siajn lingvokonon kaj parolkapablon;
- *Progresiga* – por tiuj, kiuj jam parolas esperanton sed deziras plibonigi ĝian konon. Apartan atenton oni dediĉos al la tradukaj problemoj de la ekskursakompanantoj dum la UK en Florenco.

La **trejna parto** de la seminario estos gvidata de la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, Clay Magalhaes. Oni pritraktos organizajn problemojn de la UK kun la celo formi kaj informi la volontulojn kaj la aliajn partoprenantojn pri la disvolviĝo de la kongresaj laboroj.

**Provizora programo**

**Sabato - la 29an**

10.00 alveno kaj registriĝo
11.00-13.00 lingva ekzercado kaj konversacia kurso

14.00-17.00 plukonversacioj kaj fakaj terminaroj pri turismo kaj arkitekturo
20.00 vespermanĝo

**Dimanĉo - la 30an**

9.00-13.00 la volontulaj laboroj dum UK – Zorge de KKS de UEA
14.00-19.00 daŭrigo de la ekzercado kaj de konversaciaj spertoj
20.00 komuna vespermanĝo

**Lundo - la 1an**

9.00-11.00 plukonversaciaj spertoj kaj resumaj konsideroj
11.00-13.00 plezuriga surprizo

**Sidejo**

La seminario okazos en la sidejo de Instituto GOULD en Florenco, Via de' Serragli, 49. En tiu kvartalo la trafiko estas limigita kaj ne estas permesate, al ne loĝantoj, eniri aŭtomobile. Por atingi la sidejon el la stacidomo oni povas piediri (proksimume 20 min.) aŭ veturi per busoj 36 aŭ 37, kiuj startas proksime de la stacidomo, kaj oni elbusiĝas je la dua haltejo post la transiro de rivero Arno.

**Aliĝo kaj loĝado**

**Aliĝkotizo:** 10 Euro po persono. Senpaga aliĝo por UK volontuloj.

**Loĝado:** en la Instituto Gould , laŭ jenaj prezoj po persono kaj po nokto, kiuj ne inkluzivas matenmanĝon:

| | |
|---|---|
| *unulita ĉambro kun banejo* | 45 euro (laŭ disponebleco) |
| *dulita ĉambro kun banejo* | 34 euro (laŭ disponebleco) |
| *trilita ĉambro kun banejo* | 25 euro |
| *kvarlita ĉambro kun banejo* | 23 euro |

Pro la limigita kvanto da ĉambroj disponeblaj en tiuj tagoj, oni invitas aliĝi kiel eble plej frue.

**Aliĝkondiĉoj:** bonvolu sendi: aliĝilon al R. Pinori napinori@tin.it kaj la aliĝkotizon al pĉk 37312204 je la nomo de Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, Milano. Je la ricevo de la pago ni sendos la atestilon. Por lastmomentaj aliĝoj bonvolu informiĝi pri disponebleco de la ĉambroj al Riccardo Pinori 06-58209279 aŭ 3387711429.
Se vi ne ricevis la atestilon bonvolu kumporti pagateston.

## 30a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

Diskutota temo: *"Esperanto - ĉu lingvo de paco?"*
La 30a IJF ĉijare okazos en Umbrio, en Torricella ĉe lago Trasimeno, de la 13a ĝis la 18a de aprilo 2006.
Nia Festivalo estas unu el la plej ŝatataj junularaj renkontiĝoj en la tuta Eŭropo. Oni spiras la specialan esperantan bonetoson, miksaĵo de amikemo, ĝuado, malsameco-respekto.
Partoprenas kaj fluparolantoj kaj komencantoj, kaj vi ege facile amikumos kun eksterlandanoj kaj geitaloj. Oni povas partopreni kiel plenkotizanto au memzorganto. Helpe de vi ni faciligos al la partoprenantoj vojaĝi eksterlande: petu informojn ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de via ŝtato pri la protokoloj kaj kontaktu nin.
Ĉiu-jare IEJ elektas temon por la Festivalo, pri kiu oni prelegas, diskutrondas, laborgrupas. La distra programo trakteblas en la nokta universitato. Dumtage oni povas elekti kursojn pri dancado, memdefendo, ktp. Okazos kursoj pri la itala kaj pri esperanto, por komencantoj kaj progresintoj. Dum la vespera programo ofte okazas:
koncerto, teatraĵo, internacia vespero, dumnokta promenado en la urbo, ktp. Funkcias dum la tuta nokto la trinkejo, la dancejo kaj la gufujo.
Helpe de la lokaj komunumestroj, ni klopodos vidigi la belaĵojn de la ĉirkaŭaĵoj. Kutime oni ekskursas duontagon. Kiel konate, nenio farendas dum la festivalo: ĉiu mem decidas kiamaniere (mal)ŝpari sian tempon.
Aliĝu rekte: http://iej.esperanto.it/ijf/2006 aŭ skribu al ijf.admin@esperanto.it por kromaj informoj.

## 37a INTERNACIA INFANA KONGRESETO EN PRATO 29a de Julio - 5a de Aŭgusto 2006

Okaze de la venonta Universala Kongreso en Firenze estas organizata por la infanoj la 37a Internacia Infana Kongreseto. Ĝi okazos en Prato samtempe de la Universala Kongreso.
Oni povas gastigi 45 infanojn maksimume.
Ĉe la jenaj ttt-paĝoj eblas akiri kromajn informojn pri la okazaĵo:
http://bertosch.free.fr/iik2006
Oni atendas la aliĝojn!

Leonardo Pampaloni, via Cironi 15, 59100 Prato.
Tel. 0574 604100, e-mail pampal@freemail.it

## IL VINO DEGLI ESPERANTISTI

Che c'è di meglio che bere un bicchiere di ottimo vino per brindare alla nostra salute e, al tempo stesso, aiutare la FEI?
L'esperimento dello scorso anno ha ottenuto un tale successo che siamo stati incoraggiati a ripetere l'iniziativa. Un vino di qualità ed un'etichetta in esperanto che, stavolta, non ci richiama il Natale, ma il Congresso Universale di Firenze con i cinque animali, in rappresentanza dei cinque continenti, che brindano con il vecchio Zamenhof alla salute dell'esperanto!
Si tratta dello stesso verdicchio dello scorso anno (produzione della Croce del Moro, denominazione di origine controllata, di 13,5 gradi), ma quest'anno sembra essere ancora più buono!
*Il prezzo:* € 5,50 alla bottiglia. Sono anche disponibili, per chi le vuole, due tipi di belle scatole regalo al prezzo di € 3 per due bottiglie e di € 3,20 per quattro bottiglie. Poiché il prezzo del trasporto, aggiuntivo, è inalterato fino al peso di 100 kg, non è conveniente fare spedizioni per piccoli quantitativi. Gli interessati si rivolgano, pertanto, ai rispettivi Gruppi che organizzeranno ordinazioni collettive.
Per le prenotazioni rivolgersi a: Livio Fioroni, tel. 02-89.12.57.34 oppure ad Aldo Grassini, tel. 071-31602.

## INVITO AL LA 83a KONGRESO DE 100JARA GEA Braunschweig, 2-5 junio 2006

En 2006 GEA festos sian 100-jaran jubileon en sia "naskiĝloko".
Germana Esperanto-Asocio kaj la LKK, kunlaborante kun la urba gvidantaro de Braunschweig, invitas najbarajn kaj aliajn landajn asociojn por kune memori tiun historian eventon.
Ni kore esperas je multnombra partopreno de esperantistoj el via lando en tiu grava aranĝo.
Nia kongreso prezentas diversajn interesajn temojn pritraktatajn per prelegoj kaj diskutrondoj, kaj spertindan vesperan programon.
Krom la festprelego de d-ro Ulrich Lins, okazos prelegoj de d-ro Werner Bormann, d-ro sc. Detlev Blanke, Wera Blanke, Peter Chrdle, Zlatko Tisljar, fakkunsidoj, ekumena diservo, kulturaj programeroj (klasika muziko de Trio el Herzberg, dancmuziko, koncerto de grupo Asorti el Litovio), kaj kompreneble urborigardado en Braunschweig, ekskursoj al la ĉirkaŭaĵoj.
Profitu la vojaĝon por resti iom pli longe kaj vizitu la aŭtomobilan centron de Volkswagen aŭ la ekspozicion "phaeno" en Wolfsburg (25 km), restadu kelkajn tagojn en Berlino (220 km) aŭ partoprenu la postkongresajn tagojn en Herzberg, inter 6 kaj 9 junio, vizitante la GEA-Centron kaj la Interkulturan Centron (kun Esperanto-biblioteko kaj arkivo) kaj ripozu dum ekskursoj.
Detalojn pri la kongreso, aliĝilon vi trovas ĉe la kongresa hejmpaĝo:
www.jubileagek.ic-herzberg.de
Otto Kern, Zsofia Korody, Peter Zilvar
kunlaborantoj de Germana Esperanto-Centro *Interkultura Centro Herzberg,* D-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6, Tel: +49/(0)5521-5983
www.ic-herzberg.de

## GRAVA SOMERA FESTIVALO EN BRITIO

se oni volas laŭprefere ferii posta la florenca universala kongreso, jen interesa propono pri diversaj programoj, de la 12a de aŭgusto ĝis la 18a, pretigota de Esperanto-Asocio de Britio apud Stoke-on-Trent. Oni antaŭvidas ses diversnivelajn programojn:
**A1-**Por komencintoj (sab.-mard.) **B1** Por progresantoj (mard.-vend.)
**A2-**Por progresantoj (sab.-mard.) **B2** Por spertuloj (mard.-vend.)
**C-**Sestaga turismo-programo: la partoprenanto planas sian turisman programon kaj partoprenas en la vesperaj programoj. Duonpensione.
**Ĉ-**Sestaga studprogramo: la partoprenanto sendepende studas ĉe Biblioteko kaj partoprenas en la vesperaj programoj. Pensione.
**Aliĝkotizoj:** En unulita ĉambro euroj 344 aŭ 314 (nur kun lavkuvo)
En dulita ĉambro " 315 aŭ 291 " " "
Estas eble duonigi restadon kaj kotizojn por programoj A aŭ B
**Adresoj:** Esperanto-Asocio de Britio Esperanto House – Station Road Barlaston Stoke-on-Trent ST12 9DE
www.esperantoeducation.com eab@esperanto-gb.org

## L'ERA ALLA COMMISSIONE CULTURA DELLA CAMERA

Mercoledì 8 febbraio Giorgio Pagano, segretario dell'Associazione Radicale "Esperanto", è stato ascoltato dalla Commissione Cultura della Camera dei Deputati in merito al dibattito parlamentare relativo alle proposte di legge 5714 e 6065 sull'insegnamento dell'esperanto (che decadono a seguito della fine dell'attuale legislatura). Presenti all'audizione, presieduta dall'on. Scardino di Forza Italia, alcuni parlamentari e sono intervenuti anche Lapo Orlandi e Ranieri Clerici.

Nella sua relazione, Pagano ha ricordato come i recenti passaggi legislativi del ministro Moratti hanno di fatto favorito l'annullamento dell'insegnamento della seconda lingua comunitaria a favore di un inglese assurto praticamente a seconda lingua di Stato, con rischi di precariato per le migliaia d'insegnanti delle altre lingue comunitarie e un'inevitabile dialettizzazione futura della lingua italiana.

Ha messo in evidenza che l'inglese non è né mai sarà una lingua equa, ma produrrà sempre la discriminazione tra i lingua madre e gli altri, come dimostrato dal Rapporto Grin, con trasferimenti di risorse dai paesi Europei al Regno Unito, conseguenti a tale dominio linguistico, ammontanti annualmente a 18 miliardi di Euro. Dopo aver toccato anche altri aspetti del problema, egli ha affermato che "L'esperanto costituisce la trasposizione in termini linguistici del metodo comunitario".

In chiusura l'onorevole Colasio, della Margherita, ha sottolineato la pertinenza e l'importanza delle questioni complesse sollevate, auspicando che tale dibattito possa riprendere subito dopo le elezioni politiche con una prospettiva temporale sufficiente ad un intervento legislativo significativo e finalmente vincente.

## UNA TV ESPERANTISTA

In molti abbiamo dubitato, con differenti motivazioni, sulla nota iniziativa di realizzare una Televisione esclusivamente esperantista, anche se solamente su Internet, perché immaginare una TV via etere sarebbe una vera follia. Molti pensavano che anche i costi di questa TV minore erano superiori alle possibilità, altri rincaravano la dose pensando all'esiguo drappello dei futuri addetti, ed alla loro mancanza di esperienza. Ci furono coloro che giudicarono il brasiliano s-ano Flavio Rebelo un ...tele-visionario ed altri convinti che i soldi da lui raccolti, girando il mondo allo scopo, sarebbero spariti nel nulla...

Invece no. Chi va in Internet al sito http://Internacia.tv ormai da oltre quattro mesi può constatare che essa trasmette programmi in lingua internazionale. Certo, spesso i programmi sono di relativo interesse, altre volte di qualità scadente, oppure un po' obsoleti o ripetitivi (al di là della ciclica ripetizione a fasce orarie del programma, perché questo deve giungere a tutti i fusi orari del mondo).

Non è facile disporre di materiale buono e fresco senza i mezzi a disposizione.

Questo è il difetto maggiore, insieme al doversi mantenere collegati in Internet e dover disporre di ausili tipo la ADSL. Speriamo che l'iniziativa possa continuare ed anzi migliorare.

Ma fa piacere constatare un primo successo e che i soldi offerti esattamente due anni fa hanno dato un esito positivo. E ciò vale anche per il nostro Circolo che assieme ai suoi associati, primo in Italia e fra i primi in Europa, aveva contribuito con oltre 1200 euro.

## REVENE EL JAPANUJO - Raporto de nia speciala ambasadoro

Mi revenis el Japanujo, kien mi estis invitita de Tokia Esperanto-Klubo por propagandi nian Uk-on en Florenco. La akcepto estis por mi tre korvarma kaj eĉ afabla.

Oni sufiĉe multe laborigis min: mi prelegis en Machida kaj en Shinjuku (Tokiaj partoj) antaŭ 13 kaj resp. ĉ. 100 ges-anoj; mi partoprenis en kvar seminarioj ĉe 2 Tokiaj universitatoj (Obirin kaj Tohu); mi ankaŭ faris konversacian lecionon ĉe du esperantokursoj; mi intervenis en la kunveno de japanaj blindaj esperantistoj.

Mi renkontis multajn ges-anojn treege afablajn kaj gastigemajn. Mi povis konstati, ke nuntempe Italujo estas tre populara en Japanujo, kaj miaj prelegoj pri 91a U.K. kaj la rolo de Florenco en la Itala kulturo kaj la rolo de Italujo en la okcidenta kulturo, ege stimulis la geaŭskultantojn ne perdi la okazon viziti nian landon por partopreni en la Kongreso. Kaj multaj jam asertis sian decidon ĉeesti en Florenco. Laŭ s.ino Ooba, kiu organizos karavanon en 2006, la Japanoj en Florenco estos almenaŭ 200.

*Aldo Grassini* - Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio

## INTERŜANGO DE MESAĜOJ INTER UNESCO KAJ UEA

Okaze de la reelekto de s-ro Koichiro Matsuura por nova kvarjara periodo (2005-2009) kiel ĝenerala direktoro de Unesko, prezidanto Renato Corsetti sendis al li gratulmesaĝon de UEA tuj post la elekto fare de la ĝenerala konferenco de Unesko.
Koichiro Matsuura sendis al d-ro Corsetti la ĉi-suban dankleteron.

*Sinjoro Prezidanto,*
*mi estis tre kontenta pro la gratul-mesaĝo, kiun vi bonvolis sendi al mi okaze de mia reelekto al la ĉefa posteno de Unesko kaj mi dankas vin pro ĝi tre sincere.*
*La fido al mi, kiun vi montras, estos por mi tre valora kuraĝigo en la venontaj jaroj. Kiel mi diris en la parolado, kiun mi faris okaze de la enoficiĝo kaj kies tekston mi havas la plezuron sendi al vi ĉi-kune, mi daŭrigos miajn klopodojn por adapti la Organizaĵon al la novaj defioj de niaj tempoj, konstante celante igi la homan dignon respektata. La homa digno estis en la centro de la celebrado de la ĵusa sesdeka datreveno de Unesko.*
*Unu el la defioj estos la konstruado de novaj partnerecoj, precipe kun la civitana socio kaj la privata sektoro.*
*En la momento, kiam mi komencas ĉi tiun novan mandaton, sciu, ke mi ne ŝparos klopodojn por plifirmigi niajn kunlabor-ligojn kun Universala Esperanto-Asocio.*
*Mi petas vin, sinjoro Prezidanto, akcepti miajn plej estimoplenajn salutojn.*

*Koichiro Matsuura*

## PRELEGO PRI ESPERANTO EN MILANA BIBLIOTEKO

Sekve al la invito de “Asocio de artistoj de kvartalo Garibaldi” kaj okaze de ĝia ekspozicio de pentraĵoj tie organizita, sabate la 11an de februaro ĉe la Biblioteko Dergano-Bovisa, nia sekretario Ermigi Rodari prelegis pri la temo “Esperanto, kial?”
Li skizis bildon de nia internacia lingvo kaj klarigis la kialojn kiuj pravigas la utiligon de Esperanto kiel ponta lingvo en la internaciaj rilatoj, je la teknika, morala, ekonomia kaj politika vidpunktoj.
Poste li ankaŭ pritraktis la ideologiajn kaj sociajn aspektojn kaj respondis al kelkaj demandoj de la nemultenombra sed sufiĉe interesita ĉeestantaro.

## ESTRARKUNSIDO

La unua kunsido de tiu ĉi nova jaro okazis la 13an de januaro. La sekretario konfirmis ke bone daŭras la freŝaj interrilatoj kun la esperantista grupo de Chicago, urbo ĝemeligita kun Milano, kaj ke li interesiĝis ĉe CoReCom por havi la regularon por peti kaj akiri la eblecon ĉeesti en la televidaj “Programmi dell'accesso”, kiel okazas en aliaj regionoj. Sed oni respondis ke Regiono Lombardio ankoraŭ ne pretigis ĝin kaj ke oni konsilis tamen sendi petleteron por vekiĝi la problemon. Tion oni faris. Pri la intenco de nia prezidanto interesigi pri Esperanto la Fakultaton pri Lingvoj kaj Komunikad-sciencoj ĉe Universitato en Bicocca, oni informis ke venontan mardon, post la kristnaskaj libertempoj, prof. Pennacchietti revenos al Milano por siaj lecionoj ĉe Gonzaga Lernejo kaj ke okazos renkontiĝo kun li por havi sugestojn kaj indikojn. Pri esperantaj kursoj oni konstatis ke la aliĝoj al ili estis kiel ĉiam malaltaj, sed ke ili bone daŭras.
Ĉijare nia d-ro Daminelli sukcesis havi denove partoprenantojn en milana UNITRE -Kurso. Poste oni debatis pri la kutima temo de la reordigo de la kluba biblioteko: pri tio ĉi mankas kaj bona volo labori kaj precizaj ideoj pri la agmaniero. Praktike oni konservos la ekzistantan skemon.
Oni ankaŭ informis ke oni ĝisdatigis la respondecularon de nia Klubo ĉe la poŝtĉekkonto, dum oni ne ankoraŭ aĉetis ĝiajn ŝparfondusojn ĉar estas kelkaj formalaj problemoj, eble baldaŭ solveblaj.
Pri nia ĉijara centjariĝo oni sciigis ke Regiono Lombardio petis pliajn detaligitajn informojn pri la manifestacio kiun ni intencas organizi kaj la nomojn de la ĉefroluloj. Oni tuj respondos pretigante provizoran programon por ne perdi la esperon ricevi taŭgan ejon kaj helpon.

*E.R.*

## RAVENNA – VINCITORI DEL “FABELKONKURSO”

Il vice sindaco reggente Giannantonio Mingozzi ha ricevuto in municipio quattro ragazzi ravennati distintisi al concorso mondiale “Fabelkonkurso 2005 2005”, per una fiaba in esperanto, organizzato in Finlandia. Si tratta dei fratelli Anna, Giuseppe e Chiara Bolognesi e di Federica Guerra, che hanno rappresentato le scuole elementari Rodari di Mezzano e Pascoli di Sant'Alberto e la media Valgimigli di Mezzano. I quattro giovani hanno vinto il primo premio di ciascuna categoria del concorso, fissata secondo l'età, ed un secondo premio.

Inoltre è stato conferito loro il diploma internazionale di Esperanto. Il successo è stato dedicato alla memoria di Papa Giovanni Paolo II, ritenuto "il più grande amico dell'esperanto".
In una lettera ai fratelli Bolognesi la presidente della giuria del concorso ha scritto: "Le vostre fiabe sono piaciute a tutti noi e, grazie a voi, forse un giorno qualcuno le racconterà ai propri figli e nipoti".
Chi volesse consultare i testi originali delle fiabe può farlo sul sito www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm.

## TURISMO PER ESPERANTO

La nota organizzazione turistica del nostro s-ano Aldo Foà (via Casale 7 - Milano, tel. 02.58112342 / 02.58111573, preferibilmente tra le ore 17-19 dal lunedì al venerdì) per la prossima primavera ha programmato i seguenti viaggi:

– **Pasqua nelle Fiandre** (da Bruxelles ad Amsterdam), in pullman (con ritorno diurno) dal 13 al 17 aprile. *Quota: euro 277.*
– **Ponte del 25 Aprile a Mont-St-Michel**, (Normandia e Bretagna), in pullman dal 21 al 25 aprile. *Quota: euro 229.*
– **Ponte del 1° Maggio nei Luoghi del Mistero** (Rennes-le-Chateau, ecc.), in pullman (con ritorno diurno) dal 28 aprile al 1° maggio. *Quota euro 198.*
– **Ponte del 2 Giugno: un tuffo nella natura** (Maremma, mare e isole), in pullman (con diurni sia l'andata che il ritorno) dal 1° al 4 giugno. *Quota euro 192.*

Le quote comprendono i trasporti, le escursioni all'interno dei paesi visitati, i pernottamenti in camere doppie con servizi privati e le prime colazioni.
Per il mese di agosto (con partenze intorno al 6 agosto) sono in fase di programmazione viaggi in aereo in "**Messico e Yucatan"** (da Città del Messico a Cancun), in "**Perù e Amazzonia"**, in "**Namibia e Botswana".** Invece in pullman "**Sulla via dell'Ambra"** (nei Paesi Baltici, con San Pietroburgo), in "**Scozia e Inghilterra"**, ed infine "**da Istanbul alla Cappadocia"** in Turchia.

## NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ

La novan jaron oni malfermis per la estrarkunsido, kies raporto estas legebla en alia paĝo. Tuj poste, la 20an de januaro, jen nekutima programo, ĉar preskaŭ ĉiam oni prezentas tradukojn de verkoj en la internacian lingvon kaj ne la malon. Ĉifoje niaj ges-anoj *Mariuccia kaj Ermigi Rodari*, post mallonga enkonduko por memori inĝenieron Giordano Azzi, kiu estis vera eminentulo kiel homo kaj kiel esperantisto, legis mallongan poemaron kiun li amuziĝis traduki, en sia koman dialekton: dekduon da famaj poeziaĵoj originale verkitaj en esperanto fare de konataj aŭtoroj. Unue li legis la esperantan tekston kaj poste Mariuccia la tradukon korekte, ankaŭ se ne estas facile por milananino prononci laŭ la ĝusta tono de tiu pli malmilda dialekto. Estis interesa programo kaj okazo por memorigi tiun elstaran kaj meritoplenan esperantiston.
Niaj ges-anoj *Magda kaj Ruben Conti* prizorgis la programon de la 17a de februaro, enkondukita fare de nia vic-prezidanto Aldo Foà. La temo estis ilia devenpatrujo Argentino. Ili donis unue ĝeneralan bildon de ĝi je la geografia kaj socia vidpunktoj, kune kun kelkaj informoj kaj statistikoj de lando kiu je la komenco de la 19a jarcento estis praktike senhoma, antaŭ la forta enmigrado de italoj kaj hispanoj. Tamen la modelo al kiu emis la antaŭa loĝantaro estis la franca, kiel ankaŭ pruvas la adopto, kiel simbolo de libereco, de la frigia ĉapo. Poste jen pluraj naturaj vidindaĵoj: ebenaĵoj, riveroj, pampo, valoj kaj Kordilero de Andoj. Sed oni ne forgesis la urbojn, kiel Bonaero kaj Kordoba. Aparta ĉapitro estis dediĉita al Patagonio kun ĝiaj faŭno, panoramoj kaj glaciejoj. Tipaj kaj tre konataj muzikoj de tiu lando akompanis la tutan prezenton. Je la fino de la vespera programo, la vicprezidanto de nia Itala Federacio, inĝ. *Ranieri Clerici*, ŝatata gasto de nia klubo, mallonge parolis al la ĉeestantoj pri la nuntempa lingva kaj movada situacioj, instigante ĉiujn al agemo kaj al la aliĝo al Universala Kongreso de Florenco.
La aliaj popartigitaj programoj estis plenumitaj, sed la neĝo ne permesis la 27an de januaro efektivigi la "Lingva Rondo"n. Tamen ĝi estis nur prokrastita al la 10a de februaro, anstataŭ la trafoliumado de la esperanta gazetaro. Ĝi daŭras bone, kun konstanta partopreno, samkiel la "Traduka Rondo".

## KLAĈANGULO

En la kutima reta listo oni protestas ĉar iun matenon personoj vekiĝas kaj decidas lanĉi rete peticiojn, kolektante subskribojn, favore al esperanto, sendendajn al Unuiĝintaj Nacioj, sen iaj kunordigado kaj kono de taŭgaj taktiko kaj agmaniero, kaj eĉ utiligante nur ...la anglan

lingvon, tiel sugestante ke praktike ĝi estas la internacia lingvo.
Jes, nenia komparo kun la tiama laboriga iniciato estrita de UEA, de la prizorgita teksto en la naciaj lingvoj ĝis la tutmonda kunordigado, kiu kolektis plurajn milionojn da subskriboj, personaj kaj kolektivaj.
Sed oni devas koleriĝi: pli-malpli estos kompareblaj la rezultoj.

............................

Krome oni protestas ĉar anarkie oni lanĉas samtempe tri peticiojn. He, ne! Tiu ĉi estas granda intuicio! Jen la solvo: 3, 10, 1000 peticioj, ĉiuj subskribeblaj sentrompe kaj samtempe. Per kelkaj miloj da esperantistoj ni atingos milionojn da petsubskriboj.

------------------------------------

Kutime por la asocioj kaj aliaj organizaĵoj la administra jaro finas je la 31a de decembro kaj la koncernaj jarkunsidoj okazas dum la unuaj postaj kvar monatoj. Sed pro kompreneblaj kialoj tiuj esperantistaj en Italio okazas post ok monatoj kune kun la nacia kongreso. Ne gravas: oni nur prokrastas la finon kaj ankaŭ la postan komencon. Finfine la tempo ne mankas, kiel pruvas nia Itala Instituto kies nova estraro kunsidas la unuan fojon post kromaj preskaŭ ses monatoj. Do, la postan duan jaron. Sed la estraro oficas tri jarojn.....

............................

Ne tuj malice pripensu al forgeso aŭ al neinteresiĝo! Estas plibone pristudi akurate kaj antaŭe la temojn kaj la proponojn, post la pretigo de preciza laborplano, eventuale plenumenda la postan trian jaron.

............................

Ni paŝo post paŝo, post mallonga laboro, atingos la kelon sen gloro (el apokrifa verkaro de Zamenhof).

## NOTIZIE DAL MONDO

**Valguarnera (Enna) -** È appena sorto il locale “Sicilia Esperanto-Grupo”, su iniziativa del s-ano Ugo Patti, e già è stato iniziato un corso di Esperanto di 1° grado. Complimenti!
**Roma -** È stato pubblicato “Le sfide della politica linguistica di oggi. Fra la valorizzazione del multilinguismo migratorio locale e le istanze del plurilinguismo europeo”, Franco Angeli, pagine 272, € 17,5 - a cura di A. Carli. Il testo contiene due saggi: il primo affronta la questione del multilinguismo, i suoi costi e benefici.
**Berlino -** Il congresso mondiale del PEN qui si svolgerà verso la fine di maggio 2006. La sua sezione esperantista, l' Esperanto-PEN, verrà rappresentata dal vice-presidente, s-ano Giorgio Silfer.
**Roma -** La pagina in esperanto del Museo virtuale dei cartoni animati può essere raggiunta direttamente cliccando su:
http://www.cartoonvirtualmuseum.org/index_spr.htm
**Mantova -** Il 3 febbraio scorso nella sede del Centro di Educazione Inteculturale della Provincia di Mantova si è tenuta la presentazione del Dizionario Multietnico per immigrati, realizzato in collaborazione tra il Centro e il Gruppo Esperantista Mantovano.
**Valencia -** La storica località di El Puig (a 10 km) ospiterà il 65° Congresso spagnolo di Esperanto dal 21 al 25 luglio. Informazioni e quote di partecipazione su http://www.esperanto-es.net
**San Vittore del Lazio -** Il 3 febbraio, con la partecipazione del sindaco, di altre personalità e di parecchi scrittori e poeti, si è svolto un convegno esperantista, che ha fatto anche da prologo ad un corso di 1° grado che sta per iniziare. Hanno parlato il sindaco Casoni, il presidente dell'UEA Corsetti, il prof. Iannaccone ed i s-ani Pascucci, Montagner e Valente. Il sensibile interesse suscitato ha alimentato il successivo dibattito finale.
**Belgrado -** Il 79° Congrsso internazionale della SAT qui si svolgerà dal 19 al 26 agosto. Per informazioni ed adesioni consultare:
http://users.pandora.be/jakvo/SAT/SAT-Beogrado.html
**Yzeure (Moulins) -** Invece questa cittadina francese a nord di Vichy ospiterà dal 15 al 18 aprile il Congresso della SAT-Amikaro. Notizie:
http://satamikarohm.free.fr/rubrique.php3?id_rubrique=41
**Bona Espero -** La famosa azienda-scuola nella savana brasiliana, gestita dai s-ani Grattapaglia, si è arricchita di un quarto edificio che risolve in modo razionale la sistemazione logistica della cucina e del refettorio ed aumenta la disponibilità di aule. Decisivo il contributo dato dagli esperantisti, tra i quali, oltre ai soliti tedeschi, quelli della IABE, l'associazione dei non vedenti esperantisti, ed i coniugi Aldo e Daniela Grassini, presenti all'inaugurazione insieme ai coniugi Pinori.
**Modena -** Il nuovo recapito del Gruppo Esperantista Modenese è presso la presidente: Mordacci Maura, via Boito 31 – 41100 Modena
**Torino -** in occasione delle Olimpiadi invernali , grazie al notevole lavoro del s-ano Alessandro Dematheis, il Centro Esperantista locale, con il patrocinio del Comitato Organizzatore TOROC, ha realizzato un C.D. sull'Esperanto e sugli ideali in comune con le Olimpiadi. Ben 800 C.D. sono stati distribuiti ai giornalisti di tutto il mondo.